



Dua Jarkolekto Nr. 1.
Januaro 1909.

„Konversacia Esperantista Klubo“

Kongens Nytorv 8^{III}, Kopenhago.

Kunveno ĉiun jaŭdon de 8 ĝis 12. — Oni parolas nur Esperanto

Interparolado . . . Laŭtlegado . . . Muziko.

Ĉiu Kopenhaga esperantisto membrigu!

Pri membriĝo oni turnu sin al la kasisto, kiu ĉiufoje estas renkontebla en la klubejo. Kotizaĵo 3 Kr. duonjare (membroj de aliaj Societoj apartenantaj al „Centra“, 2¹/₂ Kr.) **inkluzive abonon de „Dana Esperantisto“.**

Esperantistforeningen i København (C. D. E. L.)

Optager enhver Esperantointeresseret. — Virker hovedsagelig som Propaganda-Forening, men arrangerer ogsaa Esperanto-Koncerter og selskabelige Sammenkomster for sine Medlemmer. — Kontingent Kr. 3¹/₂ aarlig, inklusive Abonnement paa „Dana Esperantisto“. Sekretær: Stud. jur. M. Blicher, Dosseringen 81, 3. S.

Carlsberg Pilsner

Den store Fremgang skyldes Kvaliteten.

Domsango.

La 1an de februaro 1909
Esperanto-Oficejo de U. E. A.
en Kopenhago
(ĝis nun Kr. Bernikowgade 1)
domsango al
Nørre Farimagsgade 58. III.
Telefon Byen 652.

Tie ankaŭ estonte estos la adreso de
Centra Dana Esperantista Ligo
(kun diversaj komisioj)
kaj
Redakcio & Ekspedicio de
Dana Esperantisto.

Ni petas al eksterlandaj gazetoj
bonvole represi la supran.
C. D. E. L.

Flytning.

Den 1. Februar 1909 flytter
Esperanto-Oficejo U. E. A.
i Kopenhavn
(hittil Kr. Bernikowgade 1)
til
Nørre Farimagsgade 58. III.
Telefon Byen 652.

Samme Adresse gælder
fremtidig ogsaa for
Danske Esperantisters Centralforening
(og dens forskellige Udvalg)
samt
Redaktion & Ekspedition for
Dana Esperantisto

Vi beder udenlandske Blade venligst
aftrykke ovenstaaende.
C. D. E. L.



Al niaj Legantoj!

Per tiu-ĉi numero komencante la duan jarkolekton de „Dana Esperantisto“ ni esprimas nian sinceran dankon al ĉiuj danaj kaj eksterlandaj amikoj, kiuj apogis nin dum la lasta jaro, helpante nin en la laborado, aŭ simple montrante sian intereson al nia afero.

Kiel certe estas la kazo en ĉiuj aliaj landoj, tiel ankaŭ en Danujo la jaro 1908 estis la ĝisnun plej grava en la Esperanta historio. Dum oni kun intereso sekvis la okazantaĵojn en „la centro“, fondiĝis en Kopenhago en la komenco de l' jaro „Konversacia Esperantista Klubo“ kaj „Centra Dana Esperantista Ligo“, kies energia laborado stampis la restaĵojn de l' jaro.

Estas malfacile troŝati la valoron de K. E. K. kiel „Lernejo por perfektigado“ por tiuj, kiuj iom konas Esperanton, kaj ĉiuj scias la signifon de la kuniganta kaj propagandanta agado de C. D. E. L.

Preskaŭ ĉiuj aliaj danaj kluboj montras same promesplenan progresadon, kaj feliĉe ne nur inter sed ankaŭ ekster la esperantistaro troviĝas ĝojigaj postsignoj de la pasinta jaro.

Dank' al diversaj nelacigeblaj samideanoj, kiuj faris paroladojn kaj verkis artikolojn por la taga gazetaro, la intereso por nia lingvo ĉiam pli kaj pli disvastiĝas, kaj en la ĉefurbo, kaj en la provincoj.

Same laborplena jaro, kiu nun finiĝis, kuŝas antaŭ ni. Ni nur povas deziri, ke ni post ĝia foriro ĝin povos rememori kun sama ĝojo kaj danko, kun kiu ni hodiaŭ adiaŭas 1908.

En tiu espero ni deziras al nia legantaro

Feliĉan Novjaron!

Til vore Læsere!

Idet vi med dette Nummer paabegynder anden Aargang af „Dana Esperantisto“, udtaler vi vor hjærteligste Tak til alle danske og udenlandske Venner, som har støttet os i det sidste Aar ved at hjælpe os i vort Arbejde eller ved at vise Esperantosagen deres Interesse.

I Danmark, som vel i alle andre Lande, har Aaret 1908 været det hidtil betydningsfuldeste i Esperantos Historie. Medens man med Interesse fulgte Begivenhederne i „Centrum“, stiftedes i København ved Aarets Begyndelse „Konversacia Esperantista Klubo“ og „Danske Esperantisters Centralforening“, hvis energiske Arbejde har præget Resten af Aaret.

Man kan vanskeligt overvurdere K. E. K.'s Betydning som „Fortsættelsesskole“ for dem, der har sat sig ind i Esperanto, og enhver Esperantist maa anerkende Værdien af D. E. C.'s organiserende og propagerende Virksomhed.

Næsten alle øvrige danske Klubber kan opvise samme lovende Fremgang, og heldigvis er det ikke alene indenfor, men ogsaa udenfor Esperantistverdenen, at det sidste Aar har sat glædelige Spor.

Takket være forskellige utrættelige Meningsfæller, som har afholdt Foredrag og skrevet Artikler til Dagspressen, udbredes Interessen for Esperanto mere og mere saavel i Hovedstaden som i Provinserne.

Et ligesaa arbejdsrigt Aar, som det nu forløbne, ligger foran os. Vi kan kun ønske, at vi ved dets Udgang maa kunne se tilbage paa det med samme Glæde og Tak, som den, hvormed vi idag tager Afsked med 1908.

I dette Haab ønsker vi vore Læsere
Glædeligt Nytaar!

Sciigoj
de
Centra Dana Esperantista Ligo.

Ordinara Ĝeneralkunveno

okazos la 13^{an} de februaro je la 7^{1/2} h. en
Kafejo Odin, Østerbrogade 72.

Tagordo laŭ § 7 de l'statutoj:

- 1) Raporto pri la pasinta jaro.
- 2) Elekto de prezidanto kaj reprezentantoj por la estonta jaro.
- 3) Elekto de 2 revizoroj.
- 4) Traktado de proponoj alsenditaj, kaj decidoj pri ceteraj aferoj de l'Ligo.

El la reprezentantaro sin retiras laŭdezire: La prezidanto, S^{ro} Fritz Bock, S^{ino} Marie Schröder, S^{roj} Poul Borberg kaj J. P. Gjerulff; ĉar plie S^{ro} Kaj Bendix jam eksaniĝis, oni devas elekti 5 novajn reprezentantojn.

Ĉiu membro de la unuiĝoj sub C. D. E. L. povas fari proponojn al la reprezentantaro pri ĝia kompletigo, kiel ankaŭ pri ĉiuj aliaj aferoj rilate la agadon de la Ligo.

Unuiĝoj en la provincoj, kiuj intencas aniĝi al Centra Dana Esp. Ligo, kaj kiuj deziras voĉdoni (per delegitoj) dum la ĝeneralkunveno, devas esti akceptitaj kiel membroj antaŭ la 5^a de februaro.

Proponoj de unuiĝoj kaj de solaj membroj devas esti alsenditaj al la prezidanto antaŭ la 5^a de februaro, por esti pritraktataj dum la ĝenerala kunveno.

Ĉiu membro de l'unuiĝoj apartenantaj al C. D. E. L. estas rajtigata ĉeesti la ĝeneralkunvenon kiel aŭskultanto.

Oni devas montri membrokarton ĉe la eniro.

Pro verkado de

Dana Esperantista Jarlibro

eventuale domŝanĝintaj membroj de la unuiĝoj sub C. D. E. L. estas petataj sendi al la respektivaj sekretarioj kiel eble plej

Meddelelser
fra

Danske Esperantisters Centralforening.

Ordinær Generalforsamling

afholdes d. 13. Februar Kl. 7^{1/2} i
Kafé Odin, Østerbrogade 72.

Dagsorden i Henhold til Lovenes § 7:

- 1) Beretning om det forløbne Aar.
- 2) Valg af Formand og Repræsentanter for det kommende Aar.
- 3) Valg af 2 Revisorer.
- 4) Behandling af indsendte Forslag og Forhandling om Foreningens øvrige Anliggender.

Efter eget Ønske udtræder af Repræsentantskabet: Formanden Hr. Fritz Bock, Frk. Marie Schröder, d'Hrr. Poul Borberg og J. P. Gjerulff; da desuden Hr. Kaj Bendix tidligere er udtraadt, vil der blive at vælge 5 nye Repræsentanter.

Ethvert Medlem af Foreningerne under D. E. C. kan indsende Forslag til Repræsentantskabet angaaende dettes Supplering, saavel som alle andre Anliggender, vedrørende Foreningens Virksomhed.

Provins-Foreninger, der agter at indtræde i Centralforeningen, og som ønsker at stemme (ved Delegerede) paa Generalforsamlingen, maa være optaget som Medlemmer inden d. 5. Februar.

Forslag fra Foreningerne eller enkelte Medlemmer maa, for at blive behandlede paa Generalforsamlingen, være tilsendt Formanden inden d. 5. Februar.

Ethvert Medlem af de til D. E. C. hørende Foreninger har Ret til at overvære Generalforsamlingen som Tilhører.

Medlemskort maa forevises ved Indgangen.

Af Hensyn til Udarbejdelsen af

Dana Esperantista Jarlibro

anmodes Medlemmerne af Foreningerne under D. E. C. om snarest at anmelde eventuel Flytning o. l. til de respektive

baldaŭ la novajn adresojn. La kompletaj membrolistoj de l'unuiĝoj devas esti alsenditaj al la administracio de Centra Dana Esp. Ligo antaŭ la 5^a de februaro.

La Repräsentantaro.

Sekretærer. Foreningernes fuldstændige Medlemslister maa være tilsendt Centralforeningens Forretningsudvalg inden den 5. Februar.

Repræsentantskabet.

Letero
de Prof. Förster.

(Laŭ „Germana Esperantisto“).

Ĉiuj esperantistoj legos kun intereso la sekvantan gravan leteron per kiu S^{ro} Prof. Dr. W. Förster klarigas al demandanto la kaŭzon de sia eksaniĝo el la Delegitaro. Kiel oni scias, tiu fama scienculo, eksdirektoro de la Berlina observejo, estis honora prezidanto de l'komitato de la Delegitaro, sed jam de longe ne kaŝis sian malaprobbon pri la konduto de la Idistoj. Kun lia permeso, ni publikigas la tradukon en Esperanto de l'originala letero. Precipe kun granda intereso oni legos pri la intencoj de Prof. Förster rilate al enkonduko de internacia kalkulsistemo bazita sur Esperanto. Tiu, kiu konas la famon de Prof. Wilh. Förster en la tutmonda sciencularo, tuj komprenos la gravecon de tiu entrepreno kaj la grandon utilon, kiu rezultos de ĝi por Esperanto.

Westend-Charlottenburg, Nov. 1908.

Tre estimata Sinjoro!

Respondante Vian ŝatindan leteron de la 4^a nuna mi sciigas Vin, ke mia partopreno en la Esperanta movado konsistis en tio, ke mi estis ano de internacia komitato kiu devis okupi sin pri kritika esploro de la plej gravaj, ĝis nun ekzistantaj sistemoj de lingvo internacia.

La pasintan aŭtunon, tiu ĉi komitato rekonis Esperanton kiel la plej taŭgan ĝis nun ekzistantan helplingvon. Samtempe la komitato, sen intenco tuŝi la esencan kernon de la lingvo, rekomendis kelkajn reformojn, per kiuj oni kredis atingi pli rapidan kaj ĝeneralan disvastigon de Esperanto.

Sed la komitato, aŭ plibone la komiso

Brev
fra Prof. Förster.

(Efter „Germana Esperantisto“).

Alle Esperantister vil med Interesse læse følgende vigtige Brev, hvori Hr. Prof. Dr. W. Förster overfor en Forespørger forklarer Aarsagen til sin Udtrædelse af Delegationen. Som man ved, var denne berømte Videnskabsmand, fhv. Direktør for Berlinerobservatoriet, Ærespræsident for Delegationens Komité, men allerede længe har han ikke lagt Skjul paa sin Misbilligelse af Idisternes Optræden. Med hans Tilladelse offentliggør vi en Esperanto-Øversættelse af det originale Brev. Med særlig Interesse vil man læse om, at Prof. Förster agter at indføre et internationalt Tællesystem, baseret paa Esperanto. Den, der kender Prof. Försters Verdensry som Videnskabsmand, vil straks forstaa Betydningen af hans Foretagende og den Gavn, det vil gøre Esperanto.

Westend-Charlottenburg, Nov. 1908.

Ærede Herre!

I Svar paa Deres ærede Brev af 4. ds. meddeler jeg Dem, at min Deltagelse i Esperantobevægelsen har bestaaet i, at jeg har været Medlem af en international Komité, der skulde beskæftige sig med en kritisk Undersøgelse af de vigtigste, hidtil fremkomne Systemer for et internationalt Sprog.

Sidste Efteraar anerkendte denne Komité Esperanto som det bedst anvendelige, hidtil fremkomne Hjælpesprog. Samtidig anbefalede Komitéen, uden dog at ville gøre Indgreb i Esperanto-Sprogets væsentlige Kærne, nogle Reforme, hvorved man troede at kunne naa en hurtigere og mere almindelig Udbredelse af Esperanto.

elektita de ĝi*) ne sukcesis akiri la nepre necesan konsenton de la estraro de la jam tiel disvastigita esperanta organizo, por tiuj reformoj, kiujn la tuta Esperantistaro, kun tre malmultaj esceptoj, ne rigardas kiel plibonigojn.

Sed anstataŭ, en konsidero de tiu komprenebla rezisteco de la tiel entuziasma movado, konsenti al tio, ke oni klopodu enkonduki la reformojn iom post iom, la komisio, preterpasante la taskon donitan al ĝi de la komitato kaj kontraŭ la volo de eminentaj membroj de l' komitato, alprenis rilate al la estraro de la esperantista movado kritikeme superan sintenadon kaj provis disvastigi mem reformitan, kaj eĉ laŭ la ekstera aspekto esence ŝanĝitan lingvon, kiun oni laŭvice nomis „Ido“, „Ilo“, „Reform-Esperanto“, „Esperanto simpligita“ ktp., kvankam la esperantistoj ne konsentis kun la uzo de la nomo Esperanto kaj kvankam la aldonoj „Reform“ kaj „simpligita“ kontraŭdiras la konvinkon de preskaŭ ĉiuj esperantistoj.

Tia agadmaniero instigis min, ne nur fordoni la honoran prezidantecon sed ankaŭ eksaniĝi el la Komitato, ĉar en tiuj procedoj mankas, laŭ mi, ĉiu sociala saĝeco, kaj mi trovas ilin nur taŭgaj por krei konfuzon kaj meti en danĝero la progresojn atingitajn post jardekoj da longaj laboroj.

Mi mem intencas tre baldaŭ okupi min per ĉiuj fortoj pri iniciado de ĝenerala internacia reformo de la kalkulado, kiu en la plej multaj lingvoj (kaj precipe en la germana) prezentas tiom da malperfektaĵoj. Tiu kalkulumetodo, bazita sur Esperanto, estus enkondukata en la lernejojn de ĉiuj landoj apud la kalkulado en nacia lingvo kaj iom post iom uzata ĉie en la interrilatoj kaj en la tekniko.

Tio ĉi estus malgranda sed ekstreme grava komenco, kiu tre klare kaj ĝenerale komprenigus la grandegan plifaciligon alport-

Det lykkedes imidlertid ikke Komitéen, eller rettere sagt den af denne nedsatte Kommission*), at opnaa det absolut nødvendige Samtykke fra Lederne af den allerede saa udbredte Esperanto-Organisation med Hensyn til disse Reforme, som hele Esperantistsamfundet, paa meget faa Undtagelser nær, ikke betragter som Forbedringer.

I Stedet for nu, under Hensyntagen til en forstaaelig Modstand fra den saa entusiastiske Bevægelses Side at slaa sig til Taals med, at man tilstræbte at indføre Reformerne lidt efter lidt, har Kommissionen, samtidig med at den overskred det Hverv, den havde faaet af Komitéen, og i Modstrid med fremragende Medlemmer af denne, indtaget en kritisk overlegen Holdning overfor Esperantobevægelsens Ledelse, og selv forsøgt at udbrede et reformeret og endog i det ydre væsentlig ændret Sprog, som man efterhaanden har givet Navnene „Ido“, „Ilo“, „Reform-Esperanto“, „Simplificeret Esperanto“ osv., endskønt Esperantisterne har protesteret mod, at man brugte Navnet „Esperanto“ og skønt Benævnelsen „Reform“ og „simplificeret“ er i Modstrid med næsten alle Esperantisters Opfattelse. Denne Optræden har foranlediget mig til ikke blot at trække mig tilbage fra min Post som Ærespræsident, men ogsaa til at udtræde af Komitéen, thi det forekommer mig, at der i denne Fremgangsmaade savnes al social Klogskab, og jeg finder den kun skikket til at skabe Forvirring og bringe de efter Aartiers Arbejde naaede Fremskridt i Fare.

Jeg selv agter nu meget snart at sætte alle mine Kræfter ind paa Indførelsen af en almindelig international Reform af Tællesystemet, som i de fleste Sprog (og især paa Tysk) besidder saa mange Ulemper. Dette Tællesystem, som er ba-

*) Den omtalte Kommission bestod den 24. Oktober 1907 af følgende Medlemmer: Præsident, Prof. Dr. Ostwald; Vicepræsidenter, Prof. Dr. Baudouin de Courtenay og Prof. Dr. O. Jespersen; Sekretærer Dr. L. Couturat og Dr. L. Leau; fremdeles Hr. L. de Beaufront. Af Kommissionen er udtraadt Hr. Ostwald (29. Jan. 1908) og Hr. Baudouin de Courtenay. (Juni 1908).

Red. Dan. Esp.

otan en la vivon de plena, komuna helpingvo, sen tro grava enpaŝo sur la teritorio de naciaj lingvoj.

Altestime

(subskribita) Prof. Wilhelm Förster.

Kune kun la letero de Prof. Förster povos interesi niajn legantojn konatiĝi kun kelkaj rimarkoj pri sama temo, kaj faritaj de alia eminenta membro de l' Delegitara komitato kaj de ĝia komisio, nome Sro Prof. Dr. Beaudouin de Courtenay. Sro B. de C. post parolado, kiun li faris en Varsovio antaŭ kelke da tempo, dum intervjuo kun Sro Grabowski, diris inter alie: „Ĉar neniu el la ĝisnunaj reformaj projektoj superas la tradician Esperanton, ĉar neniu prezentas novan enkorpiĝon de la lingvo internacia, kaj ili, ne esceptante „Idon“, estas nur fik-laboroj, sekve adoptante principe Esperanton oni devas respekti la tradicion esperantistan kaj ne fari atencon kontraŭ la kontinueco de tiu-ĉi tradicio. Ĉiuj ŝanĝoj, enkondukitaj rapideme, malbonigas nur la tutajn kaj kaŭzas la neceson de novaj ŝanĝoj kaj modifikaĵoj.

Sed ĉiu ŝanĝebleco, ĉiu nekonstanteco, ĉiu ŝanceliĝo en lingvo internacia artefarita povas nur fortimigi la homojn, kiuj volas ĝin akcepti kiel ilon de tutmonda interkompreniĝo. Kvankam mi ĝenerale ne estas konservatisto, en tiu-ĉi okazo mi estas konservatisto decidita.

Ni povus ekzemple kritiki la lingvon francan kaj proponi kelkajn ŝanĝojn, se ne en la lingvo parolata mem, almenaŭ en la lingvo skribata (ortografio). Sed ni absolute ne povus realigi niajn proponojn sen la konsento de la francoj, t. e. de la parolantoj france.

La esperantistoj devas esti rigardataj kiel asocio lingvista jam ekzistanta. Nenia komitato aŭ komisio ne-esperantista havas la rajton trudi al ili ŝanĝojn gramatikajn aŭ leksikajn. Se eĉ tiu komisio estus kunmetita el plej kompetentaj individuoj kaj plej bone elektitaj de diversaj delegacioj kaj sciencaj korporacioj, ĝi ne ĉesus havi en la okuloj de esperantistoj arbitran karakteron.

Post la volapükistoj ĝuste la esperantistoj realigis la ideon de lingvo internacia en vastaj dimensioj kaj enkorpiĝis ĝin en

seret paa Esperanto, skulde da indføres i alle Landes Lærestalter jævnsides med Nationalsprogets Tællesystem, og lidt efter lidt bruges overalt i det mellemfolkelige Samkvem og i Tekniken.

Dette vilde være en lille, men yderst betydningsfuld Begyndelse, som meget klart vilde vise, hvilken overordentlig Lettelse den almindelige Indførelse af et fuldstændigt, fælles Hjælpesprog vil bringe, uden at der dog derved gribes altfor stærkt ind i Nationalsprogenes Omraade.

Med Højagtelse

(signeret) Prof. Wilhelm Förster.

Samtidig med Prof. Försters Brev vil det kunne interessere vore Læsere at stifte Bekendtskab med nogle Bemærkninger om samme Æmne, fremsatte af et andet fremragende Medlem af Delegationens Komité og Kommission, nemlig Hr. Prof. Dr. Baudouin de Courtenay. Hr. B. de C. har efter et Foredrag, han holdt i Warschau for nogen Tid siden, i et Interview med Hr. Grabowski bl. a. udtalt:

„Da intet af de hidtil fremkomne Reform-Projekter staar over det hævdvundne Esperanto, idet intet af dem frembyder nogen ny Form for det internationale Sprog, og da de „Ido“-sproget herfra ikke undtaget, kun er Lappearbejder, bør man følgelig ved i Principet at antage Esperanto respektere den esperantistiske Tradition og ikke gøre Anslag mod Fortsættelsen af denne Tradition. Alle i Hast indførte Ændringer ødelægger kun Helheden og bevirker blot, at nye Ændringer og Modifikationer bliver nødvendige.

Men enhver Foranderlighed, Usikkerhed og Vaklen indenfor det internationale Kunstsprog kan kun bortskræmme de Mennesker, som vil antage det som Middel til mellemfolkelig Forstaaelse. Skønt jeg i Almindelighed ikke er konservativ, saa er jeg det dog afgjort i dette Tilfælde.

Vi kunde f. Eks. kritisere det franske Sprog og foreslaa nogle Ændringer, om ikke i selve Talesproget, — saa dog i Skriftsproget (Ortografien). Men vi kunde absolut ikke gennemføre vore Forslag uden Samtykke af Franskmandene, d. v. s. de fransktalende. Esperantisterne maa betragtes som et alt bestaaende Sprogsamfund. Ingen ikke-esperantistisk Komité eller

*) La priparolita komisio konsistis la 24. de oktobro 1907 el la jenaj sinjoroj: prezidanto, Prof. Dr. Ostwald; vicprezidantoj, Prof. Dr. Baudouin de Courtenay, kaj Dr. O. Jespersen; sekretarioj, Dr. L. Couturat kaj L. Leau; plie: Sro L. de Beaufront. El la komisio eksaniĝis Sro Ostwald (29. de januaro 1908) kaj Beaudouin de Courtenay (juno 1908).

Red. Dan. Esp.

formojn daŭrajn kaj akceptitajn de granda parto de la inteligenta homaro. Kiu decidigas rompi la unuecon de la Esperantistaro, entreprenas paŝon tre riskan kaj malbon-konsekvencan, sekve mi, volante eviti tiel gravan respondecon, estis devigita eksanigi el la Delegacia konstanta Komisio."



Esperanto en Danlando.

K. E. K.

Vere sukcesa fariĝis la esperantista Kristnaska festo. Unue okazis bonega koncerto kun afabla helpo de S^{ino} Melchior, S^{roj} Gunder Knudsen kaj Stibolt, fortepi-ane akompanitaj de S^{ino} Busch; la plej brilaj numeroj estis „La Asroj“ (S^{ino} M.) kaj konata dana marista kanteto, al kies freŝaj vortoj — en bonega tradukaĵo de S^{ro} Krabbe — unu el la du junaj kantistoj komponiciis vivan melodion.

Poste oni dancadis ĉirkaŭ malgranda kristnaska arbo, kies branĉoj portis por preskaŭ ĉiuj membroj specialan donacon, akompanatan de amuza verseto, verkita de S^{ino} Grave.

La 7. januaro okazis ordinara ĝeneral-kunveno, dum kiu oni reelektis la estraron kun escepto de la kasisto S^{ro} Barüel, kies ofico momente postulas lian tutan tempon. Anstataŭ li oni elektis S^{ron} Ed. Lassen.

Kun la plej granda malĝojo la K. E. K.-anoj aŭdis pri la foriro de S^{ro} Barüel, kies fervoregan, sindoneman laboron kaj tutan amindan personecon ni ĉiuj tiel multe ŝatas.

Ni esperu, ke ni iam denove havos la plezuron lin aŭdi sprite kaj ŝerce gvidi la diskutadajn kunvenetojn; malfacila tasko, lin anstataŭi tie kiel „bazokreanton“.

Kommission har Ret til at paatvinge dem grammatiske eller leksikalske Ændringer. Selv om den paagældende Kommission bestod af de mest kompetente Personer, valgte paa bedste Maade af forskellige Delegationer og videnskabelige Korporationer, vilde den dog i Esperantisternes Øjne stadig have en egenmægtig Karakter. Efter Volapükisterne har Esperantisterne rigtigt og i stort Omfang virkeliggjort Tanken om et internationalt Sprog og iklædt den en varig og af en stor Del af den intelligente Verden antaget Form. Den, der beslutter sig til at bryde Esperantistsamfundets Enighed, foretager et farligt og skæbnessvangert Skridt; derfor har jeg, da jeg ikke ønsker at paatage mig et saa alvorligt Ansvar, været nødsaget til at udtræde af „Délégation's permanente Kommission“.

Fra Provinsen.

Som det var at vente, blev d'Herrer Kaj Bendix og Vilh. Michelsens Propaganda-Rejse et formeligt Triumftog. Enhver, der kender Hr. Bendix, véd, i hvor høj Grad han evner at rive sine Tilhørere med sig og holde dem fangne ved sit uimodstaaelige Lune. Det maatte være et underligt Publikum, som ikke overgav sig paa Naade og Unaade for hans Specialitet: et 2 Minutters Kursus i Esperanto, — eller som kan undgaa at begejstres for Sproget naar saa ypperlig en Sanger som Hr. Vilh. Michelsen „taler“ dets Sag.

Efter en vellykket Begyndelse i Odense fortsatte Tournéen op langs Jyllands Østkyst og agter sig endelig efter et lille Op- hold i København, til Malmø og Bornholm.

Vi skal i næste Nummer berette udførligt om Rejsens Forløb og Resultater.

I Vest- og Midtsjælland fortsætter Frk. Blach ufortrødent sin Propaganda; det er lykkedes hende rundt om i de større Byer at vække formaaende Mænds Interesse for vort Sprog, saa der vil sikkert snart spørges glædelige Nyheder fra Sorø, Slagelse, Korsør o. s. v.

Tutmonda Movado

(Privataj leteroj kaj ekstrakto el la diverslanda gazetaro).

Eŭropo.

Anglujo. Pli kaj pli disvastiĝas Esperanto en Anglujo kaj ĝia alprenado estas sentebla de monato al monato, dank' al pacienca, nelacigebla laboro de „nia diligenta kolegaro“. La 11. de novembro en Caxtan Hall, okazis la unua propaganda kunveno de l' nove fondita „Londona Federacio de Esperantistoj. La devizo de tiu Federacio estas „Kunigitaj ni venkos — antaŭen!“ kaj certe oni bonege komencis.

Dum la posttagmezo malfermiĝis ekspozicio tre zorge preparita, kie oni elmontris ĉiuspecajn Esperantaĵojn. Inter priblindulaj aferoj oni elmontris Braille'an skribmaŝinon, kiun uzis blindulino, montrante ĝin al la ĉeestantoj, kiuj scivole plenigis la ekspoziciejon.

La parolintoj estis precipe lia Moŝto F. Hemphill de l' Londona Komerca Ĉambro, S^{ro} Kol. Pollen, S^{ro} G. Cox, kiu klarigis la strukturon, kaj S^{ro} T. W. Stead, kiu parolis pri la neceseco de Esperanto inter la delegitoj ĉe l' Paca Kongreso en Hago, — kie oni tute — malbone sin interkomprenis.

Ad. Ŝ.

Aŭstrio. En Vien ĉiam plifortiĝas la Esperanta movado, precipe per la oferema propagandlaboro de l' Esp. Societo „Fidelfeco“, kies prezidanto kaj vicprez. S^{roj} Macho kaj Siebenschlein gvidas grandajn kursojn.

Antaŭnelonge fondiĝis „Esperanto-Informejo de Vieno“ Goldeggstr. 11¹, Wien VII/2, kiu donas ĉiujn informojn kaj plenumas ĉiujn komisiadojn rilate la Esp. movadon en Aŭstrio.

Belgujo. Belga Ligo Esperantista elsendis la unuan numeron de „Belga Esperantisto“ kiun nun estas oficiala organo anstataŭ „Belga Sonorilo“, kiun aĉetis la ilistoj.

En Antverpeno oni fervore laboras por povi inde akcepti la internacian Esp. kongreson en 1910.

Universala Esperanto Asocio fondis novan fakon por Komercio kaj Industrio.

Francujo. Tri el la plej fervoraj kaj sindonemaj Esp. propagandistoj en la mondo — S^{roj} Red. Carlo Bourlet, Sekr. Gabriel Chavet kaj la nelacigebla „svisa apostolo“ Edmond Privat — faris triumfan vojaĝadon tra Francujon esperantigante ĉiun regionon, kiun ili trapasis. —

En Saint-Etienne oni ĵus teksas rubandojn kun la portreto de D^{ro} Zamenhof. Lasta modo por ĉapeloj, printempo 1909! —

La Pariza organo por aerflugado L'Aéro nun malfermis siajn kolonojn al la Esperanta propagando, ĉar kiam baldaŭ la scienco estas nuliginta la distancojn estas tute necesega, ke oni flanke de la nun ekzistantaj ĉirkaŭ mil diversaj lingvoj kaj idiomoj havas unu komunan helplingvon.

— La „Pariza Fakultato de Medicino“ oficiale akceptis Esperanton.

Germanujo. En Gotha okazos dum la venonta jaro la tria germana Esperanto-kongreso, kiu havos grandan signifon por la organizacio de la Germana Esperantista Societo, kiu estos nomata Germana Esperantista Asocio. La ministraro permesis la enkondukon de Esperanto en la komercaj klasoj de la reala lernejo. Por la unua kurso jam anonciĝis 50 lernantoj. Sammaniere Esperanto estos instruata en la virina lernejo por perfektigado.

Rumanujo. Reĝino Elisabeth, kiu tiel ofte montris sian grandan intereson por nia lingvo, intencas nun enkonduki Esperanton en la blindulejon en Bukarest, por ke ĉiulandaj geblinduloj tie povu kolektiĝi kaj kompreni unu la alian.

Ameriko.

Meksiko. La meksikaj esperantistoj jam komencis organizi la 10^{an} kongreson, kiu okazos en la jaro 1910, samtempe kun la centjara datreveno de la sendependeco de l'lando. Eĉ se Meksiko estas malmulte konata al la eŭropanoj oni esperas, ke ĝiaj multaj altiraĵoj allogos vojaĝamantajn esperantistojn grandare.

Azio.

Japanujo. Prof. Dr^o Kroita el Tokio, kiu estas konata el multaj danoj de la lasta orientalistkongreso en Kopenhago (kaj de la Esp. kongreso en Dresdeno) estas elektita de la „Japano Societo de Paco“ kaj „Japano Esperantista Asocio“ kiel japana delegito al la Kongreso de Paco okazonta en Londono. Estas la unua fojo ke japano partoprenos en Kongreso de Paco, kaj Prof. Kroita intencas ĉe tiu okazo paroli nur Esperante.

Aŭstralio.

Dum la lasta vojaĝo de v/s „Suevic“ de Melbourne al Londono fondiĝis Esperanto-Klubo de 35 personoj, reprezentante dek landojn i. k. diversaj aŭstraliaj ŝtatoj kaj New Zealand.

La vicprezidanto de l'Melbourn grupo fariĝis prezidanto; ĉiutage dum unu monato oni aranĝis kunvenon, kaj ĉe la adiaŭo en Londono la samklubanoj donis reciproke promeson pri daŭrigota propagando.

Foruden de almindelige Leveregler,

der indskærpes enhver dansk Esperantist fra hans tidlige Ungdom, og som han derfor kender tilbunds i den Alder, da han begynder at abonnere paa (og læse) *Dana Esperantisto*, findes der forskellige særlige Punkter, der absolut ikke maa forsømmes.

Enhver dansk Esperantist bør saaledes, for at komme Idealet saa nær som muligt, indrette sit Liv paa kosmopolitisk Vis. Heraf følger, at han straks om Morgen til sin Te eller Kaffe indtager en eller flere af Holles Honningkager eller Tvebakker; Honningkagerne er de mest internationale, idet de er lavet af fineste engelsk Honning og amerikansk Mel efter tysk Recept og pakke i Esperantokasser, men ogsaa Tvebakkerne er i høj Grad mellemfolkelige. Særlige Gourmander nøjes ikke med en bar Tvebak eller Kage, men forsyner den med et tykt Lag af den bekendte Sanella-Margarine, som mange foretrækker for det mindre drøje Smør. Chacun a son ragoût! Til Politiken, som man nyder til Frokosten, anbefales det at drikke en Carlsberg (hvis store fremgang skyldes Kvaliteten), og bagefter delikaterer man sig med en Plade af Galle & Jessens lækre Esperanto-Chokolade. Senere paa Dagen maa man en Tur i Luften, og den velhavende Esperantist, der har købt sig en Bil i N. Larsens Vognfabriker i Bredgade, hvor man baade taler, skriver, telefonerer og telegraferer Esper-

anto, gaar naturligvis ikke. Det maa derimod vi andre stakkels Djævle; bliver det Regnvej, slaar vi selvbevidst vor i Københavns Paraplyfabrik erhvervede Noblesse Paraply op, — men hvis vi endnu har lidt Mammon tilovers, der ikke er slugt af Propagandaen, lader vi Daleen springe, slaar paa Traaden til 9001 og suser hjem i et af disse Samfærdselsmidler, der har samme Betydning for det materielle Samkvem som Esperanto for det aandelige. Om Aftenen studerer man Udlandets Esperanto-Presse og Literatur, og kan man ikke nøjes med Esperanto alene, saa tager man sin Cykle, tænder Asp-Lygten og kører op til Skeel-Gjorling, der underviser i alle mulige og umulige Sprog, eller man slukker sin Tørst efter Lærdom paa Stenografisk Institut.

Enhver samideano, der trofast overholder denne Levevis, vil regelmæssigt hver Nat drømme, at *Dana Esperantisto* udgaar i et Oplag af 25,000 Eksemplarer. Samtidig vil vore Annoncører kunne leve af Esperantismen, og naar dette sker, gaar ogsaa Drømmen i Opfyldelse, thi saa faar vi det 100-dobbelte Antal Annoncer, og „*Dana Esperantisto*“ vil være sikret for et ufattelig langt Tidsrum. I Esperantismens og Annoncørernes fælles Interesse haaber vi derfor, at alle samideano'er vil lægge sig disse Punkter paa Sinde og saaledes bidrage til at skaffe os alle, ikke mindst vore ærede Annoncører,

Et glædeligt Nytaar!

Pro la ĝeneralkunveno de Centra Dana Esperantista Ligo la sekvanta numero de D. E. ne aperos antaŭ ol en la fino de februaro.

Af Hensyn til Centralforeningens Generalforsamling vil næste Nummer af D. E. ikke udkomme førend i Slutningen af Februar.

Redaktion og Ekspedition: Esperanto-Oficejo, N. Farimagsgade 58, København (Kopenhago). Telf. Byen 652.

Ni rekomendas la anonekolonojn de D. E. al alilandaj Gazetoj kaj Librejoj.

Jurnaloj intersangataj kun „Dana Esperantisto“

(Mendeblaj en Esperanto-Oficejo, Kopenhago).

Naciaj Propagando-Revuoj.

Anglujo. The British Esperantist . Sm. 0,75	— Esperanto Gazeto..... Sm. 0,75
— The Esp. Instructor..... „ 1,00	Brazilujo. Brazila Revuo Esp. „ 2,40
Aŭstrio. Informaj Raportoj „ 1,00	Peru. Antaŭen Esperantistoj „ 1,20
Belgujo. Belga Esperantisto „ 1,00	
Bohemujo. Časopis Českých Esperantistů „ 1,50	
Bulgarujo. Lumo „ 0,80	
[Danlando. Dana Esperantisto.... „ 1,40]	
Francujo. Franca Esperantisto .. „ 1,60	
— Paris-Esperanto „ 0,60	
— Le Monde Espérantiste .. „ 0,80	
— Sarta Stelo..... „ 0,40	
— Normanda Stelo..... „ 1,00	
Finnlando. Finna Esperantisto ... „ 1,20	
Germanujo. Germana Esperantisto „ 1,50	
— Germana Esperanto Gazeto „ 2,00	
— Saksa Esperantisto .. „ 0,40	
Hispanujo. Hispana Revuo..... „ 1,30	
— Suno Hispana „ 1,20	
— Stelo Kataluna „ 1,20	
— Tutmonda Espero „ 1,20	
Holando. Holanda Pioniro „ 1,25	
— Amsterdama Pioniro ... „ 1,25	
Hungarujo. Verda Standardo..... „ 1,75	
Italujo. Roma Esperantisto „ 1,20	
Norvegujo. Norvega Esperanta Gazeto..... „ 1,10	
Polujo. Pola Esperantisto „ 2,10	
Rumanujo. Rumana Esperantisto. „ 1,60	
— Rumana Gazeto Esp. .. „ 1,50	
Skotlando. K. T. P. (Kies Timema Plumo?)..... „	
Svedujo. Esperantisten..... „ 1,40	
Svisujo. Svisa Espero „ 1,00	

Ameriko.

Usono. Amerika Esperantisto Sm. 2,05	
Meksiko. Verda Stelo..... „ 2,00	

Azio.

Filipinaj Insuloj. (Usono)	
Filipina Esperantisto „ 1,60	
Japanujo. Japana Esperantisto .. „ 1,60	

Aŭstralio.

Melbourne. The Australian Esperantist..... „ 1,50	
--	--

Specialaj Gazetoj.

Oficiala Gazeto Esperantista (Paris) Sm. 1,00	
Esperanto. U. E. A. (Genève)..... „ 1,20	
Internacia Scienca Revuo (Genève) „ 2,40	
Lingvo Internacia (Paris) „ 3,00	
Vocho de Kuracistoj (Lwow) „ 1,00	
Internacia Revuo Pedagogia (Bystrice—Hostyn)..... „ 1,50	
Polica Revuo (Budapesto) „ 1,00	
Tra la Filatelio (Beziers) „ 0,80	
Internacia Socia Revuo (Paris) .. „ 2,40	
Espero Katolika (Tours)..... „ 2,00	
Juna Esperantisto (Paris)..... „ 1,00	
La Spritulo (Leipzig) „ 1,20	

Diversaj Gazetoj

enhavantaj artikolojn en kaj pri Esperanto	
Welt-Warte (Leipzig) Sm. 1,00	
Plume Sténographique (Limoges) „ 2,75	
L' Aéro (Paris) „ 3,00	
Progreso (Paris) „ 2,05	
Belga Sonorilo (Bruxelles)..... „ 1,60	

**Ciuj danaj Esperantistoj
legas „Politiken“.**

„Dana Esperantisto”.

Abono = 1,10 sm. jare + poŝttago.

Oni abonu per la poŝto aŭ ĉe:
Esperanto Officejo, N. Farimagsg. 58III
København K.

Anoncoj ($\frac{1}{12}$ pago) po 2,75 sm.
Jaraj anoncoj rabaton de 25 %. Kore-
dancoj 10 spesd. po linio.

Abonnement (Kr. 2,00 + Porto)
tegnas paa nærmeste Postkontor eller
Esperanto Officejo, N. Farimagsg. 58III
København K.

Annonceer ($\frac{1}{12}$ S.) Kr. 5 pr. Gang.
Aarsannoncer 25 % Rabat. — Esper-
antokorrespondancer 20 Øre pr. Linie.

Dansk Patent 7021.



**Kjøbenhavns
Paraplyfabrik**

Østergade 58.

**PATENT-PARAPLYEN
NOBLESSE**

**N. Larsens
Vognfabrikker,**

Fabrik Smallegade 52. Telf. 58II.
Udsalg Bredgade 20. — 1594.

Automobiler og alle
Arter af **Køretøjer.**

Plantemargarinen

SANELLA

er et rent vegetabilsk Produkt
og indeholder absolut ingen dy-
riske Fedtstoffer.

Faas overalt.

Hovedoplag:

$\frac{A}{S}$ SANELLA, København B.

**Galle & Jessens
Brud-Chokolade,
Kakaopulver,
Konfitterer.**

Nyt i Spisechokolade:

Esperanto-Chokolade.

Asp-Lygten.

3 Kr. 50 Øre uden Linse.

4 Kr. med Linse.

Taxamotor 9001

aaben Dag og Nat.

Bedste Vogne

Hurtigste Expediton

Billigste Kørsel.

STENOGRAFI

Maskinskrivning

Københavns stenografiske Institut

SKOUBOGADE 6. Tlf. 29.315.

Esperanto

**Spansk—Portugisisk
Engelsk—Tysk—Fransk**

Undervisning. Oversættelse.

Kursus. Enetimer.

Translatør **Fr. Skeel-Gjørting**

Nørre Farimagsgade 58

Telef. Byen 652.

Biskvitoj kaj Mielkukoj

Bona biskvito, maŝtraja biskvito, sekala
biskvito kaj mielkukoj.

Skribu al la farejo de **F. Holle,**
Aalborg, Danujo.

Laŭpete mi sendas senpage (se la provizo
sufiĉas) paketon kun unu el la tri artikoloj.

Lærerne bedes ved deres Indkøb erindre de Firmaer, der støtter Bladet med Annoncer.